Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Panevėžys, Litovio

# Abelo



Sabato, la 13-a de julio 2019

***N-ro 8***

# Koncerto “Sola kaj kune”



Merkrede vespere je 20.00 okazis en la salono de aranĝoj en la komunuma centro belega koncerto de la koreaj artistoj Jogailė Čojūtė, Sung Minwoo kaj Kim Yulhee, kiu plenigis la salonon.

Jogailė Čojūtė kaj Sung Min-woo sukcese montris sian muzikan kunlaboron jam en Seulo (2017) kaj Poznano (2018) kaj denove prezentis sin en Panevėžys dum la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.



Jogailė Čojūtė estas juna, 17-jaraĝa kantistino-modelino. Ŝi naskiĝis en esperantista familio: la patro estas koreo kaj la patrino estas litovino. Ŝi frekventis muzikan lernejon dum 10 jaroj kaj lernis klasikan kaj popularan kantadojn.

Jogailė Čojūtė kantis tri-foje en la litova televido por la plej prestiĝa kantkonkurso “Dainų dainelė” (Kanteto de la Kantoj) inter la litovaj lernantoj kaj junuloj. Ŝi gajnis premiojn en pluraj internaciaj kaj enlandaj lernejanaj kantkonkursoj. Ŝi kantis plurfoje la litovan himnon en internaciaj sportaj matĉoj.

En Esperantujo ŝi kantis “Tempo pasos nur” dum la muzika paŭzo de la inaŭguro de la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo, akompanate de la korea muzika trupo “MAJU”. Ŝi kantis kun la korea ensemblo dum la koncerto “Pacon Kune” en



ARKONES 2018. Tiu sukcesa prezentado estigis novan projekton de kunlaboro por koncerti en BET-55 sub la inicitato kaj muzikaranĝado de Sung Min-woo (Kune). Sung Min-woo estas korea muzikisto. De la infaneco li interesiĝis pri korea tradicia muziko kaj finis mezlernejon kaj supermezlernejon pri korea tradicia muziko. Li studis muzikan komponadon en la universitato Hanyang en Seulo. Li ludas diversajn koreajn muzikajn instrumentojn, precipe degumon (korean longan bambuan transversan fluton).

Li gajnis premiojn en pluraj konkursoj pri korea tradicia muziko kaj faris multajn koncertojn sola aŭ kun muzikaj trupoj en kaj ekster Koreio. Li kunfondis muzikan trupon “MAJU”, kiu koncertis en la 102-a Universala Kongreso en Seulo kaj en la 102-a UK en Lisbono.

Dum la koncerto de BET-55 Jogailė Čojūtė, Sung Minwoo kaj Kim Yulhee prezentis precipe koreajn kantojn, tradukitajn al Esperanto, kiuj estas tre



Fotoj: Gražvydas Jurgelevičius

popularaj en koreaj filmoj aŭ televidaj dramserioj, vaste spektataj tra la mondo. La kantojn muzikarangis Min-woo kun unika tono por koreaj tradiciaj muzikiloj. Ili prezentis ankaŭ litovajn kaj internacian kantojn.

Videoj: *https://youtu.be/4D4VNBEFUFg:*
Kie dormas vent'; *https://youtu.be/Bp656icmf0I:*
Tempo pasos nur

# Ĵurnalista kunveno

**La 11-an de julio je la 11-a horo dek-kelkaj personoj, membroj de la ĵurnalista asocio TEĴA kaj interesatoj, kunvenis en la ĉambro 205, por priparoli la nunan staton de la asocio.**

Alfred Schubert, prezidanto de TEĴA, prezentis la financan kaj membran statojn, atentigis pri la leĝaro rilate al la sekureco de la personaj datumoj kaj al la neceso ŝanĝi la membromastrumadon en la asocio. Oni decidis esplori kaj utiligi spertojn de aliaj Esperanto-organizaĵoj pri la persondatumoj.

Oni prokrastis kooptadon de ekstereŭropa estrarano al Lahtio, kie okazos la sekva kunveno de TEĴA; intertempe la estraro kontaktos eventualajn kandidatojn.

Aleksander Korĵenkov memorigis, ke ne estas plenumita la decido de la TEĴA-kunveno en Rejkjaviko (2013) pri lanĉo de la premio "La artikolo de la jaro". Li ankaŭ informis pri retrovo de pluraj malnovaj numeroj de "Internacia Ĵurnalisto", kiuj poste estos je dispono de seriozaj esplorantoj. **Halina Gorecka**



## *Abelo* adiaŭas kaj dankas

La redaktoro de ***Abelo*** dankas al la kontribuintoj kaj al la legantoj pro la atento – kaj al la organizantoj de BET-55 pro la vere brila kaj neforgesebla jubilea aranĝo! **Stano Marček**



# Vizito al Juda domo



Iom neantaŭanoncite okazis vizito ĵaŭde tagmeze al la malnova juda knabina lernejo. Tie ankoraŭ tri ĉambroj estas daŭre dediĉataj al judaj aferoj, pluraj muroj kun kortuŝaj primilitaj fotoj ktp. Sed ankaŭ kun interesaj internaciaj judaj objektoj.

Ni venis tien kaj ricevis la tipan „matzes"-panon. Kaj ni devis iom diskuti, ĉu la prezento estus en la rusa, hebrea „ jiddisch" aŭ en Esperanto...

Evidente ĉeestis la israela familio de Amri Wandel (kun simbolaj donacoj)... kaj finfine Mikaelo Bronŝtejn eĉ kantis belan esperantlingvan baladeton. – Bela vizito!

**Anne Tilmont**

# „Avo kiu estas nepo"




Mi volus iom reklami novan libron de Roman Dobrzyński „Avo kiu estas nepo". Vere ĝi ne estas fabelo por infanoj. La libroservistino en BET-55 komence metis ĝin apud fabelojn :-).

La libro la unuan fojon prezentas biografion de Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof. Ĝi enhavas liajn multajn fotojn. Roman Dobrzyński ricevis la permeson de Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof skribi lian oficalan biografion. Bonovolu anonci al la BET-anoj ekziston de tiu ĉi libro en la BET-eja libroservo. La libro estas grava dokumento en nia Esperantujo. **Robert Kamiński**
la enpaĝigisto

# Prelegoj de Gong Xiaofeng



Gong Xiaofeng, konata inter esperantistoj kiel Arko, havis dum BET-55 kelkajn prelegojn: „Instruado de Esperanto en ĉinaj universitatoj kaj lernejoj“ (lunde), „Konciza historio de Esperanto-movado en Ĉinio“ (ĵaŭde) kaj „Kiel efike atingi kapablojn de Esperanto-instruantoj“ (vendrede).

Gong Xiaofeng naskiĝis en 1962 Ŝi diplomiĝis pri kemio, poste doktoriĝis pri nutra scienco kaj laboras kiel profesoro pri media scienco kaj inĝenierado. Ŝi eksciis pri Esperanto en ĵurnalo, kaj eklernis ĝin en 1980. Baldaŭ ŝi mem instruis Esperanton, interalie kiel nedevigan kurson dum kelkaj jaroj ĉe Nanchanga Universitato. En 2006-2007 ŝi laboris kaj esploris kiel vizitanta profesoro en Universitato Cardiff, Britio. Ŝi aliĝis al loka Esperanto-klubo kaj aktive partoprenis ne nur lokajn E-aktivadojn, sed ankaŭ Britan Esperanto-kongreson kaj Skotlandan Esperanto-kongreson. Ŝi partoprenis la 50-an Internacian Semajnon (IS) en Germanio, dum kiu ŝi sukcese trapasis la ekzamenon pri lingva kapableco, organizitan de Germana Esperanto-Instituto. Post tio ŝi faris Esperanto-vojaĝon en Francio, Germanio, Svislando, Nederlando kaj Belgio, kaj multe praktikis la lingvon. Reveninte al Ĉinio ŝi tuj komencis instrui Esperanton en sia Universitato, ĝis nun sume pli ol 500 studentoj lernis Esperanton. Ŝi helpis siajn gestudentojn fondi Esperanto-asocion en Universitato de Nanĉang en la jaro 2011, kie nun estas pli ol 50 membroj. Ŝi ne nur instruas Esperanton al la studentoj, sed ankaŭ gvidis ilin partopreni seminariojn kaj diversajn trejnkursojn en Kantono, en Hajnano, en Tianjin ktp. En la jaro 2008 ŝi klopodis por restarigi la Ĉinan Sekcion de ILEI, kaj de tiam ILEI-CN kreskas rapide. Ŝi ĉeforganizis seriojn da seminarioj pri Esperanto-instruado kaj trejn-kursaron en diversaj urboj, ekzemple: ILEI-seminariojn en Lushan (2009), Taiyuan (2010), Tianjin (2011), Kunming (2012), Changzhou (2014); tri sesiojn de ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA) en Tianjin (2011), Kunming (2012) kaj Quanzhou (2016); tri Vintrajn Esperanto-Kursarojn kaj kelkajn KER-ekzamenojn. Kiel prezidanto de Jiangxi-a Esperanto-Asocio, ŝi organizis kvin sesiojn de Lushan-forumoj de Esperanto (2008-14). Gong Xiaofeng estis vicprezidanto de ILEI (2013-18) kaj prezidanto de Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj (2009-2018).

# Ukrainia koncerto



La 8-an de julio en la ĉefsalono okazis koncerto de BET-partoprenantoj, venintaj el kelkaj landoj, sed havantaj rilaton al Ukrainio.

Iniciatinto de la koncerto estis Marina Moritz-Korot‘, kiu pertelefone el Stokholmo kontaktis la partoprenontojn, diskutinte programon de la koncerto. En ĝi estis ukrainaj popolaj kaj nuntempaj kantoj, kantoj kreitaj aŭ tradukitaj de eks-ukrainianoj.

La ensemblo konsistis el: Vladimir kaj Ella Kononjuk el Germanio, Natalia Ivanova kaj Tatjana Kolomijec el Ukrainio, Sergeo Straŝnenko el Latvio, Natalia Berce el Svedio, Mikaelo Lineckij el Ukrainio-Israelo. Akompanis ĉion per elektronika piano kaj sopilko Marina, kiu estis animo, inspiranto kaj motoro de la evento.

En plenumo de la ĉarma kanto „Jerusalem‘ de or‘“ al ni helpis edzino de la Prezidanto de ELI Amri Wandel (Esperanto-Ligo de Israelo) Gila Wandel, kantinta unu strofon de la kanto en la hebrea.

Iom variigis la programon skeĉo „Ekzameno pri logiko“ fare de V. Kononjuk kaj M. Lineckij. La koncerto estis varme akceptita de la publiko.

# Koncertis Mikaelo Bronŝtejn

Ĵaŭde vespere havis en la ĉefa BET-salono koncerton Mikaelo Bronŝtejn. Li regalis la publikon per siaj novaj kaj la famaj malnovaj kantoj. Sed krom la novaj kantoj li verkis por nia *Abelo* ankaŭ jenan poemon pri BET-55!



*Inter pluvo kaj pluvet‘*
*Bone fartas ni en BET –*
*Kun prelegoj malenuaj*
*Kun ekskursoj logaj, ĝuaj,*
*Kun koncertoj sentovekaj,*
*Se ne pluvo, nek pluvet‘*
*Ni kontentus tute, sed...*

Tamen mi estas plene
kontenta, dankon – dankon!

# Esperanto sur la strando

Eble vi jam jam estis en nia bela urbo Gdańsk. Jes, ĝi havas interesan historion, jes ĝi estas bele situita ĉe Balta Maro, jes estas en ĝi multaj vidindajoj.

Ĉi-foje ni proponas rigardi la urbon kiel la lokon, kie renkontiĝis kaj daŭre renkontiĝas pluraj kulturoj.

Nin ĉiukaŭas etnaj regionoj: Kaszuby kaj Kociewie, kaj al tiuj regionoj la ĉi-jara evento estos dediĉita. Prelegojn prezentos etnografoj de Gdańska kaj Toruna muzeoj. Ni preparis tute novan urban ludon kaj planas ekskurson al la regiono Kociewie. Venu al “Esperanto sur la strando 2019” kaj partoprenu en ĝia riĉa programo! Pliajn informojn donos al vi la BET-anino Jadwiga Greger.

**Ĉi-jara renkontiĝo estos dediĉita al najbaraj etnaj regionoj :**

**Kaszuby/Kaŝubio**
**kaj**
**Kociewie/Koĉevio**

**tradicio kiu daŭras vilaĝe ĝis nun, spuroj de historie multkultura Gdansko**

**Ni kore invitas !**

Kiel ĉiujare en septembro (12.09 - 15.09) okazos nia evento: “Esperanto sur la strando”. Ĉi-jare ĝi estos dediĉita al la menciitaj najbaraj etnaj regionoj. La bonan nivelon de la programo garantias kunlaboro de la esperantistoj – organizantoj kun la loka etnografia muzeo kaj aplaŭdo de la Kaŝuba – Pomeria Societo.

Interese estas, ke en la aranĝo partoprenos la lingvisto d-ro Paolo Hopkins el Kanado, kiu esperantlingve prezentos prelegon pri la kaŝubaj lingvo kaj literaturo.

La ekskurso al Pelplin, en la regiono Kociewie, ebligos renkontiĝon kun la tradiciaj kaj nuntempaj kulturelementoj de tiu ĉi interesa regiono.

Kiel en la antaŭaj jaroj, la partoprenantoj de la aranĝo aliĝos al la parado de neregistaraj organizaĵoj en Sopot. Ni kore invitas vin! Venu al Gdansk kaj Sopot, partoprenu kaj ĝuu! Informoj ĉe: *torentosopot@wp.pl*



Sur la dua etaĝo de la universitata konstruaĵo, apud la ekspozicio de ZEOJ, estas ekspozicio de Andreo Sochacki.

**La adiaŭa koncerto okazos sabate vespere! Kiu deziras partopreni, bv. urĝe kontaktiĝi kun s-ro Mikaelo Lineckij, kiu kompilas la programon!!!**




esperanto BENELUKSA

# Beneluksa Kongreso 2019

Grupo de belgoj venis al Panevėžys. Eble grupo de litovoj interesiĝus veni al Belgio? :-) Bonvenon!

La Beneluksa Kongreso okazos ĉi-jare en Charleroi 19-22 septembro 2019. Ĉi tiu urbo estas malmultekoste atingebla per aviadilo. La kongresejo troviĝas kelkcent metrojn de la ĉefa stacidomo. La unua aliĝperiodo estas plilongigita ĝis la 15-a de julio. Aliĝis jam pli ol 50 personoj. Pliajn informojn kaj aliĝilon vi trovos en la retejo *www.benelukso.eu*
Se vi interesiĝas kaj volas veni, informiĝu ĉe

**Yves Nevelsteen** per *yves@ikso.net*



**Lastmomenta informo: Matenmanĝo en J. Žemgulio dimanĉe ne okazos.**